



Protokolo

Reta Komitatkunveno de TEJO

Februaro 2022

1-a sesio, sabaton 26-an de februaro 11:00-14:00

Protokolas: Wojtek

[Antaŭ malfermo: [Kontrolado de ĉeestantoj](#)]

1. Malfermo

- o Elektro de kunsidestro

Roĉjo bonvenigas ĉiujn partoprenantojn kaj rapide sekvas voĉdonado pri elekto de Karlos Peskera Alonso kiel kunsidestro. Li estas elektita unuanime.

- o Elektro de voĉdona komisiono

Por la elekta komisiono kandidatiĝas Tomáš kaj Vit, kaj ankaŭ Michael V. antaŭe pretis kandidatiĝi, sed nun retiriĝas pro kandidatiĝo de la aliaj du. Elektitaj estas komitatanoj Tomáš kaj Vit, ankaŭ unuanime.

- o Elektro de propona komisiono

Por la propona komisiono kandidatiĝas Manuela. Bezonatas du personoj je tiu ĉi posteno, do post momento ankaŭ Roĉjo konsentas kandidatiĝi. Du kandidatiĝoj ankaŭ estas akceptitaj unuanime (2 voĉoj sindetenaj).

2. Tagordo

Ĝenerala Sekretario prezentas la tagordon ([alirebla en aparta dokumento](#)).

- o Fikso de cetera tagordo

Oni voĉdonas pri amendoj al tagordo:

- *Pri rezolucio pri forpaso de Claude Nourmont: por 27, kontraŭ 1, sindetene 0.*
- *Forstreko de financa raporto de la tagordo: jese 27/ kontraŭe 1/ sindetene 0.*
- *Movo de la alelekto de estrarano al la komenco de la dua sesio kaj translokiĝo de la Centra Oficejo post la paŭzon de la unua sesio: jese 27/ kontraŭe 0/ sindetene 1.*
- *Akcepto de la amendita tagordo: 28/0/0. La Komitato akceptas ĉiujn amendojn.*



3. Claude Nourmont

Hanso legas tekston de la rezolucio pri forpaso de Claude Nourmont. La Komitato akceptas la rezolucion unuanime (unu voĉo sindetena).

4. Ĝisdatigoj el komisionoj

o Projektoj/Subvencioj

Raportas prezidanto Léon Kamenicky. Li komence mencias, ke pli detala priskribo de lia agado je tiu fako troviĝas ankaŭ en [la jarraporto](#). Li priskribas la laboron de la subvencipeta teamo (kun dungitaj oficistoj Karlos kaj Spyros, aliaj estraranoj kaj helpo de CO-volontuloj); li listigas longe ĉiujn projektojn kaj senditajn kandidatiĝojn. Kreita estas ankaŭ faka laborgrupo pri subvencipetoj kaj financoj. Unu el ĉefaj celoj estas daŭre disvolvi subvencipetan agadon kun partopreno de organizoj de aliaj kontinentoj.

o Aktivula trejnado

Raportas Inès. Estis ĝisdatigita la listo de la TEJO-trejnistoj, kaj okazis ĉeesta TTR en Bjalistoko en decembro. Ines kaj David (la komisiito) laboras kun la komisionanoj de Projektoj/Subvencioj. Ili provizas trejnistojn por ĉiuj projektoj (ĝis nun KKPS, X-lingvo, Diversa sed Egala, Esplorante Demokration). Kaj estis subvencipetitaj du novaj projektoj por trejni novajn trejnistojn: TnT (KdE) kaj TTT (Erasmus+). Ines organizis la trejnadojn por novaj komitatanoj kiuj okazis antaŭ la KoKu. Ines starigis laborgrupon por ĝisdatigi la kurson por novaj komitatanoj de TEJO-Akademio. Koncerne tiu fako okazas retaj renkontiĝoj ĉiujn du monatojn. Por pliaj detaloj ŝi redirektas al la jarraporto kaj realigplano.

o Eksteraj rilatoj

Raportas Valentin. Dum tiu ĉi mandato li koncentriĝas pri ĝisdatigo de dokumento pri lingvopolitikaj pozicioj: kreita estas aparta laborgrupo pri tio. Li rakontas, ke ankaŭ TEJO de nelonge estas en konsultaj rilatoj ĉe UN, kie, kelkaj aktivuloj estas akreditigitaj por ĉeesti en kunsidoj en UN-sidejoj en Novjorko kaj Vieno. Valentin ankaŭ rakontas pri multaj eventoj, en kiuj KER reprezentis TEJOn (FoJE, nova UN-laborgrupo pri lingvopolitiko kaj lingvaj rajtoj, pluraj aliaj).

o Talento kaj Kongresoj

Alekĉjo konfesas, ke li 'faris malmultege', ĉefe pro sanaj problemoj. Rilate al kongresoj: li planas viziti kongreslokon de 2023 kaj starigi la organizan teamon. Pri ĉi-jara IJK: preparadoj iras sufiĉe bone kaj laŭ plano. Komitatano Patricio demandas pri ofta malĉeesto de Alekĉjo en kunsidoj de estraro.

o Egaleco kaj Informado

Raportas denove Inès. La komisionanoj proponas nuntempe amendon pri malfermaj alvokoj al la ĝenerala reglamento. Ines baldaŭ eklaboros pri voĉlegado de la revuo Kontakto.



Koncerne Informado, Ines proponis kaj sekvas la ĝisdatigon kaj tradukon de flugfolioj de TEJO por ekstera publiko (ankaŭ por provizi al niaj Landaj Sekcioj). Lenka zorgas pri tio, kaj jam kolektis tredukojn de ĉirkaŭ 20 lingvoj.

- o Financoj

Veronika aldonas pri laboroj por balancigita buĝeto kaj financa stabileco por dungitaj oficistoj. Ŝi strebas trovi financajn eblecojn por kunlabori kun LS de aliaj kontinentoj. Ŝi ankaŭ kunlaboras en nova laborgrupo pri financoj kaj projektoj por transdoni sian sperton de financa mastrumado.

- o Edukado, Scienco, Kulturo kaj LFA

Komence Albert nur informas, ke li estas ekstere kaj momente ne povas raporti. Iom poste li montras la prezentaĵon, kiu resumas agadon de la komisiono pri landa kaj faka agado. Aldone, li raportas, ke KODEJO estas preparata, same kiel Kontinenta Junulara Kongreso. Venontaj projektoj de lia teamo estas ankaŭ "Sekcio de la semajno; TEJO en via areo", kiu celas prezenti agadon de diversaj sekcioj kaj Junulara Movada Foiro, planata okazi dum IJK. Koncerne Edukadon, Sciencon kaj Kulturon: estas organizataj ĉiumonataj retaj prelegoj, baldaŭ aperos ankaŭ alvokoj por "scienca kafejo" (projekto je kiu instruistoj prezentas sian agadon kafumante).

Poste parolas Nickson kaj demandas pri komisiono pri LFA, kun kiu ŝajne malfacilas kontakti (aperis teĥnikaj problemoj ĉe li). Albert respondas, ke ja estis tempo kiam kontakto kun li povis esti malfacila, interalie pro problemoj pri oficiala retadreso.

Manuela demandas pri Universitata Agado. Albert konfesas, ke tiu ĉi branĉo estas neaktiva pro manko de aktivuloj. Léon aldonas, ke respondeca divido en tiu ĉi fako povis ne esti sufiĉe klara kaj pardonpetas pro tio.

5. Ĝisdatigo pri volontuloj

- o Volontula programo

Léon raportas: estas 4 volontuloj en Roterdamo, 3 volontuloj kadre de ESK-programo, kvara volontulo danke al kunlaboro kun EKC en Tuluzo (franca programo Civita Servo). Ĉiuj loĝas en Volontula Domo kaj laboras en Centra Oficejo sub superrigardo de Clement, eksa volontulo kaj nun nove dungita kunordiganto laboranta surloke ekde Februaro. Mentoroj de volontuloj estas Inès kaj Valentin, ili ege helpas komence al volontuloj. Preskaŭ ĉiuj volontuloj daŭre partoprenas en lecionoj de Esperanto kun Sabi.

MB demandas pri la planata estonteca disvolvigo de volontula agado. Léon rakontas, ke venos pluraj aldonaj kandidatiĝoj, kaj li ŝatus havigi pli, sed ne estas fizika spaco por pliaj loĝantoj en volontula domo, pro tio nuntempe povas esti nur kvar personoj maksimume. Tamen li mencias, ke kadre de volontulaj programoj tre indas kreskigi grade la nombron da volontuloj, eble en aliaj organizoj. Subvencipetisto Karlos klarigas formalizaĵojn de ESK-programo pri gastigado de volontuloj.



- De la volontuloj mem

Parolas Wojtek, Lenka kaj Léonardo, ĉiu pri siaj devoj, taskoj kaj celoj. Ĉiuj kvar volontuloj kundividigas ordinarajn oficejajn taskojn: venanta poŝto kaj retpoŝto, subteno de estraranoj kaj komisionoj, ankaŭ subteno de oficistoj de UEA. Ĉiu volontulo ankaŭ havas siajn proprajn taskojn, depende de interesiĝoj kaj bezonoj. Wojtek klopodas rekrei lokan Esperanto-klubon organizante ĉiusemajnajn renkontiĝojn, Léonardo pretigas kaj dissendas novaĵleteron TEJO-Aktuale, Lenka helpas multe pri arĥivado de revuoj Kontakto kaj Esperanto. La kvara volontulino, Livia, ne partoprenis en la kunveno pro planita anticipe feria periodo.

6. Jarraporto 2021

- Prezento kaj demandoj pri jarraporto

Roĉjo prezentas [la jarraporton](#).

Manuela demandas pri Junaj Amikoj. Roĉjo konfesas, ke tiu ĉi agado estas neglektita. Pro tio planota por sekva elekto de komitatanoj C devas esti prokrastita.

- Voĉdonado

Oni voĉdonis pri akcepto de jarraporto: 24 voĉdonas por, 6 sindetenas. Voĉdona komisiono akceptas jarraporton.

7. Realigplano

Roĉjo prezentas [realigplanon](#). Li substrekas, ke tiu ĉi ne estas ankoraŭ finita kaj ekzistas ankaŭ labora tabelo/realigplano, kiun estraro pli ofte uzas por organizo de ĉiutaga laboro de tuta TEJO-stabo.

Oni voĉdonas: 22 por, 2 kontraŭ, 3 sindetene. Komitato akceptas realigplanon 2021/2022.

8. Paŭzo

Kunsidestro anoncas 10-minutan paŭzon.

9. Translokiĝo de Centra Oficejo

- Resumo de la situacio

Léon resumas la situacion: la Komitato de UEA decidis pri vendado de la konstruaĵo de centra oficejo, kiu estas ankaŭ nuntempa sidejo de TEJO. Vendado de volontula domo ne estas konsiderata. Léon ĝoje informas, ke interesoj de TEJO pri organizado de laboro de oficistoj kaj volontuloj en Roterdamo restas sekuraj kaj ke de vidpunkto de TEJO ne multe ŝanĝos, almenaŭ en venontaj monatoj. Li instigas aliajn esprimi opiniojn kaj demandi.

En diskuto partoprenas ankaŭ Hanso kaj Jonathan. Hanso klarigas, ke kaj li kaj Karina kiel reprezentantoj de TEJO ĉe UEA jam voĉdonis jese pri la vendo de la konstruaĵo kaj nun la



decido estas definitiva, laŭ delonge komunikataj informoj kaj planoj. Patricio plendas pri nesufiĉa komunikado de pozicio de TEJO pri tiu ĉi afero al Komitato kaj membraro. Hanso defendas, ke la tuta procezo estis bone komunikata por tiuj, kiuj sekvis la temon. Léon ankaŭ komentas listante ĉiujn agadojn por komuniki de la komenco de lia mandato, pruvante, ke dum ĉiu estrara kunsido la protokoloj estas disvastigataj al la Komitato ekzakte por informi tutan komunumon prie. Simile opinias MB.

- **Prezento de TEJO-planoj**

Léon informas, ke nenio draste ŝanĝiĝos kaj oficeja spaco por TEJO estas jam sekura kaj restos post la vendo. Li certigas, ke ĉiuj paŝoj estas ĉiam tuj komunikataj. Hanso instigas baldaŭ eki debaton pri sekvaj movoj: pri praktika traktado de malplenigado de la konstruaĵo, kiu estos granda defio kaj por TEJO kaj por UEA.

10. Novaj landaj sekcioj

Kunsidestro anoncas prezentadon de du novaj landaj sekcioj de TEJO, de Indonezio kaj Senegalo; li petas prezenti sin kaj agadon de sekcio al la Komitato.

- **IEJO**

Prezantas sin Arifah, prezidanto de IEJO, Indonezia landa sekcio. Ŝi uzas apartan prezentadon por prezenti agadon de indonezia Esperanto-junularo, nuntempan estraron de la organizo, antaŭan kunlaboron kaj aktivecon kun TEJO, kaj fine kialojn por aliĝi al TEJO.

- **SEJ**

Parolas Cheikh Ahmadou Bamba Diaw, prezidanto de Senegala Esperanta Junularo. Li prezentas estraron de SEJ, celojn kaj programon de la organizo, kiu agadas en Senegalo ekde 2017.

- **Voĉdonado**

Albert klarigas formalizaĵojn de petoj de IEJO kaj SEJ iĝi landa sekcio de TEJO, tamen ambaŭ sekcioj ne plenumas ĉiujn; ĉefe pro zorgoj pri statutoj, kaj pro tio la voĉdonado ne povas okazi dum hodiaŭa sesio.

11. Lingvopolitikaj pozicioj

- **Enkonduko kaj malferma diskuto**

Enkondukas kaj komencas diskuton Valentin. Ĉefa demando temas pri lingvaj problemoj en landoj de komitatanoj. Ekparolas ankaŭ Arya, Alekĉjo kaj Karlos. Valentin instigas ĉiujn partopreni en laboroj pri la dokumento pri novaj lingvopolitikaj pozicioj de TEJO per aparta retpoŝta fadeno, en kiu estas aldonita tuta Komitato.



12. Ĉifrovalutoj

- Alvoko por laborgrupo pri ĉifrovalutoj

Jonathan enkondukas konĉize en la temo de bitmono: la celoj, avantaĝoj kaj ebla utileco por la movado. Li ne proponas konkretajn postulojn por oficiale agnoski aŭ voĉdoni, sed kuraĝigas ĉiujn interesitajn komitatanojn por kunlaboro pri la temo de ĉifrovalutoj. KuboF parolas subtenante, Veronika substrekas, ke de kasista vidpunkto ŝi opinias, ke bitmono ne estas taŭga aŭ helpa ilo por financa mastrumado de la organizo.

Volas paroli pluraj komitatanoj, tamen Karlos interrompas diskuton pro tempo-elĉerpo. La sesio finiĝis je la 14.16 UTC.



2-a sesio, sabaton 26-an de februaro 15:00-18:00

Protokolas: Lenka

La dua sesio komenciĝas je la 15.00 UTC de kontrolado de ĉeestantoj.

1. Alelekto de estrarano

- Klarigo pri vaka posteno kaj vakaj fakoj

Léon parolas pri rezigno de unu estrarano, kio estis bone klarigita kaj komunikita. Nun estas vaka posteno por nova estrarano. Léon klarigas, kial ne estis farita malferma alvoko: por ke la proceso estu pli facila kaj rapida kaj pro tio, ke Tyron jam estas konata kaj kunlaboris kun TEJO. Li dankas al Inès, Albert kaj Valentin pro ilia laboro kaj al la Komitato ĝenerale. Inès dankas Leon kaj komentas la situacion.

Alekĉjo parolas pri sia situacio, akcidento kaj malfacilaĵoj, pro kiuj li ne povis sufiĉe efektive bone labori. Li ankaŭ parolas pri ŝanĝo de estraranoj, ke malfacilas "survoje" iĝi nova estrarano kaj pri sia posteno, estrarano dediĉita al kongreso. Li diras, ke anstataŭ havi estraron dediĉitan al kongreso, estus pli bone havi grupon/komision de aktivuloj, inkluzive kasiston kaj lokajn organizantojn. Ke estu tuta stabo, kiu zorgus pri kongreso.

Valentin memorigas, ke ankaŭ estas volontuloj, kiuj povas helpi. Rilate al Tyron kiel kandidato, li jam helpis multe pri arĥivado, historio en CO, ankaŭ pro tio li taŭgas kiel kandidato por estrarano.

Inès demandas, ĉu Alekĉjo planas resti estrarano. Ŝi konsentas, ke laborgrupo pri kongreso estus bona. Ŝi demandas pri aliaj respondecoj kaj fakoj de Alekĉjo.

(Informado: Uriel ne ĉeestas, estus demandoj por li.)

MB memorigas ligojn inter komisiono pri kongreso kaj estraro. Li konsentas, sed ankaŭ pensas, ke daŭre devus esti respondeca estrarano. MB parolas pri Junaj Amikoj, ankaŭ demandas pri Uriel. Estis menciita, ke Uriel maltrafis du sinsekvajn voĉdonojn.

Tyron rimarkigas longajn problemojn pri (ne)aktiveco de Uriel kaj Alekĉjo, sed dum ĉi tiu kunsido ne estas bona tempo kaj la temo estos preparolita aliatempe.

- Prezento de kandidato(j)

Tyron sinprezantas rapide. Unue li pardonpetas pro neĉeesto en la unua parto (li ĵus translokiĝis). Li parolas pri sia aktiveco en Esperantujo, ĝisnuna laboro pri arĥivado kaj pri sia volo iĝi estrarano.

- Voĉdonado



Voĉdonado pri alelekto de Tyron Surmon: 18 por/2 kontraŭ. Tyron estas elektita, iĝas estrarano.

Proponita voĉdonado pri aldono de eksigo de estraranoj al la tagordo post la nuna tagordero. Rezulto: 25 por/2 sindetene. Komitato aldonas tagorderon pri eksigo de estraranoj.

Alekĉjo ŝatus fokusiĝi pri io, pri kio li kapablas ekz. kongresoj. Roĉjo demandas, ĉu li pretas iĝi komisiito pri kongresoj kaj Alekĉjo respondas, ke jes. Tyron demandas, ĉu tio signifas, ke post tio li ne plu estus Estrarano. MB demandas, ĉu Alekĉjo demisias kaj pretas iĝi komisiito pri kongresoj.

Alekĉjo ne certas pri la proceso de demisiigo aŭ eksigo, sed li pensas, ke li pli utilas kiel komisiito ol kiel estrarano. Léon atentigas pri pli da vakaj postenoj post tio.

Valentin ankaŭ parolas pri kiomo de estraranoj. Li pensas, ke pli bonus, ke la demisio estu en la fino de la kunveno kaj iĝo de komisiito poste. Uriel: neĉeesto kiel maltrafo de voĉdono?

Inès proponas paroli pri tio nun, ne fine, pro la aliaj tagorderoj.

Tyron pensas, ke endas atendi kaj trakti la aferon eĉ post kelkaj tagoj.

MB diras, ke Alekĉjo sendu mesaĝon pri demisio al la Estraro, por ke ĝi estu formala. Li klarigas, kiel maltrafoj de voĉdonoj estas priskribitaj en la reglamento kaj li proponas tuj fari malferman alvokon por novaj estraranoj.

Sekvas debato pri interpretado de paragrafo pri maltrafoj de voĉdonoj.

Léon volas tuj malfermi alvokon por aktivuloj, ke eĉ por nespertuloj estas ŝanco aliĝi al teamo nun kaj malrapide lerni kaj poste kandidatiĝi somere kun spertoj.

Alekĉjo decidis mem demisii.

Ĉu voĉdoni pri eksigo de Uriel? Patricio volas doni al Uriel eblon paroli pri tio. Léon parolis pri pasinta bona komunikado kun Uriel, kiu promesis pli bone labori kaj komuniki pri problemoj. Li klarigas, ke Uriel jam havis plurajn ŝancojn kaj mentorojn, sed post hodiaŭa neĉeesto Léon denove ne scias, kio okazas.

KuboF diras, ke laŭ liaj spertoj en aliaj organizoj Uriel simple estas neaktiva. Indas anstataŭgi lin kun alia pli aktiva estrarano.

Voĉdonado pri tio, ĉu Komitato eksigas la estrararon Uriel Gurián. 16 por/ 1 kontraŭ/3 sindetene.

2. Reglamentaj ŝanĝoj de Roĉjo

Ĉiuj ŝanĝoj kun klarigoj kaj komentoj estas alirebla en [aparta dokumento](#).

Roĉjo prezentas ŝanĝojn de la Reglamento kaj klarigas ilin.

- Ŝanĝoj pri komitatkunvenoj

Temas pri digitalaj aŭ fizikaj kunvenoj dum aŭ ĉirkaŭ IJK, dumkunvenaj postenoj kaj lingvaĵoj.



Rezultoj de voĉdonado:

1.1. 19 por/1 kontraŭ/7 sindetene

1.2. 20 por/1 kontraŭ/6 sindetene

1.3. 21 por/1 kontraŭ/5 sindetene

Ĉiuj proponoj estis akceptitaj.

○ Ŝanĝoj pri komisionoj

Ŝanĝoj pro "translokiĝo" al interreto, forigo de kelkaj partoj (2.1., 2.2.a, 2.3.a, 2.4.a).

Sekvas propono aldoni unu plian opcion: "Je elektiĝo Komitatanoj estas invitataj de la ĜS membriĝi en almenaŭ unu komisiono libere elektebla." kaj debato pri revertumado.

Rezultoj de voĉdonado:

1.1. 22 por/2 kontraŭ/2 sindetene

<i>Nur 2.2a</i>	<i>3</i>
<i>Prefere 2.2a, alie 2.2b</i>	<i>4</i>
<i>Prefere 2.2b, alie 2.2a</i>	<i>2</i>
<i>Nur 2.2b</i>	<i>15</i>
<i>Neniu</i>	<i>2</i>

<i>Nur 2.3a</i>	<i>9</i>
<i>Prefere 2.3a, alie 2.3b</i>	<i>4</i>
<i>Prefere 2.3b, alie 2.3a</i>	<i>3</i>
<i>Nur 2.3b</i>	<i>8</i>
<i>Neniu</i>	<i>2</i>

<i>Nur 2.4a</i>	<i>6</i>
<i>Prefere 2.4a, alie 2.4b</i>	<i>3</i>
<i>Prefere 2.4b, alie 2.4a</i>	<i>2</i>
<i>Nur 2.4b</i>	<i>6</i>
<i>Neniu</i>	<i>9</i>

La voĉdona komisiono deklaras la rezulton nevalida, ĉar ne ĉiuj voĉdonis pri komplika demandaro.

Karlos kaj aliaj proponas movi la voĉdonon al alia sistemo ol Zoom, ĉar ĝi nun estas tro komplika kaj sen la teksto videbla. Debato ĉu ŝovi voĉdonadon al reto.

Voĉdonado:

La Komitato decidis rete voĉdoni pri la restantaj reglamentaj ŝanĝoj proponitaj de Roĉjo. 21 por/2 kontraŭ/ 4 sindetene; estis akceptita



- Ŝanĝoj pri komitatanoj

Roĉjo rapide klarigas.

- Ŝanĝoj pri estraranoj

Roĉjo rapide klarigas.

- Ŝanĝoj pri IJK

Roĉjo rapide klarigas.

3. Mallonga paŭzo

Ekde 17.04 ĝis 17.14

4. Reglamentaj ŝanĝoj de Egaleco

- Ŝanĝoj pri malfermaj alvokoj

Ĉiuj ŝanĝoj kun klarigoj estas alireblaj en [aparta dokumento](#).

Prezantas Inès. Ŝi volas, ke la voĉdonado okazu per Zoom. Temas pri reverkitaj reglamentaroj kaj eventualaj forigoj.

Propono pri procedura propono:

“La Komitato decidus fari retan voĉdonadon pri la reglamentaj ŝanĝoj proponitaj de la branĉo Egaleco.”

Rezulto: 14 por/9 kontraŭ/4 sindetene; Procedura propono estis akceptita, voĉdonado estis ŝovita al reto.

Sekvas debato pri malfacilaĵoj kiel voĉdoni rete, ankaŭ pri malmulte da tempo dum ĉi tiu kunsido kaj pri tio, kiel ekzakte voĉdoni rete.

Inès kaj MB klarigas konkretajn ŝanĝojn kaj precizigojn.

5. Monda paco

- Diskuto pri pozicio aŭ deklaro pri nuntempa milito

Valentin parolas pri ĝisnuna agado, pri ĉeesto en reta kunveno de FoJE de Valentin kaj Tuŝka. Ĉefe aktivuloj de KER jam ekverkis [tekston](#). Oni ankoraŭ ne decidis, ĉu TEJO faru deklaron.



Tyron kontraŭas la deklaron pri neŭtraleco de TEJO aŭ eventuala malforteco de la deklario kaj sekva kritiko de TEJO. Li ĉefe zorgas pri EO kaj lingvopolitiko. Malgraŭ propraj sentoj li ne pensas, ke estas bona ideo fari ion eksplicite.

Valentin diras, ke homoj plendus ĉiukaze, ĉu ni ion faros aŭ ne.

Patricio post legado de la proponita dokumento diras, ke ĝi estas sufiĉe neŭtrala kaj ke ĝi taŭgus. Li mencias uzon de Pasvorta Servo por helpi al homoj de Ukrainio.

Valentin diras, ke TEJO estas neŭtrala, se temas pri ĝiaj celoj, sed la deklaro mem estas simbola subteno de viktimoj. Li mencias homajn rajtojn kaj eblojn kiel interpreti la esprimojn. Manuela konsentas kun publikigado de la dokumento, ĉar Valentin bone klarigis pozicion de TEJO.

KuboF demandas, ĉu ni ankaŭ faru deklarojn pri aliaj konfliktoj kaj militoj.

Albert diras, ke TEJO publikigu iun tian deklaron kaj ankaŭ mencias militon en Irako en 2003. Valentin mencias alvokon al paco de UNOY, ke TEJO estis parto de tio kaj tial jam iom engaĝiĝis en simila situacio. La deklaro ne endanĝerigas nian neŭtralecon.

Laŭ Tyron estus bone fari ĝin per aliaj organizoj, ekz. UNOY. Ĉu ni bezonas memstaran?

Léon mencias tre viglan diskuton ĉe Telegramo. Li subtenus la deklaron. Li mencias, ke multaj TEJO-anoj proksimas al Ukrainujo kaj ke ni devus agi kaj helpi, ekz. reklami eblojn kiel helpi.

Patricio mencias videbligon ankaŭ de aliaj problemoj.

Voĉdonado pri plilongigo de la kunsido: 15 por/ 13 kontraŭ/ 1 sindetene; Estis akceptita 30-minuta plilongigo.

Léon diras, ke nun estas tempo preparoli kaj taskigi iun, ne eblas longe atendi. Karlos diras, ke KER povas mem decidi kaj labori pri la dokumento sen demandi al la Estraro, se la nuna propono estus akceptita. La Estraro tiel esprimus fidon en la komisiono.

Voĉdonado "La Komitato taskigas la komisionon pri eksteraj rilatoj por pretigi rezolucion pri la milito en Ukrainio."

Rezulto: 19 por/8 kontraŭ/2 sindetene; Estis akceptita.

KER komencu verki, kundividi + doni komentrajtojn por estraranoj, por ke la teksto estu finita frue. Limdato proponi la dokumenton ĝis morgaŭ 27-a de februaro, 20 UTC.

6. Ceteraĵoj

Patricio proponas uzi Pasportan Servon por rifuĝintoj. Karlos diras, ke tio jam funkcias, sed estas malmulte da esperantistoj.

Valentin mencias FOJE, traduki, diskonigi informojn de ili, kion niaj membroj povas fari, kiel helpi al rifuĝintoj.



7. Fermo

La Komitatkunveno finiĝas je la 18.27 UTC.